Aruŝo ĵaŭdon, la 8-an de aŭgusto 2024 numero 5

# La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

## Ĝenerala diskuto pri la estonteco de Esperanto en Afriko

Aliĝu al la publika diskuto pri la estonteco de Esperanto en la kontinento. Esperanto, kiel internacia lingvo, proponas multajn eblojn por kreskigi interkulturan komunikadon kaj proksimigi homojn. La kunveno okazos en la salono *Lala* ĉi-posttagmeze je 16.45-17.30 kadre de la 5-a parto de la 46-a Esperantologia Konferenco.
Ĉu vi estas progresinta Esperanto-parolanto, komencanto aŭ simple scivolema lerni pli, vi estos bonvena aŭdigi viajn ideojn. Venu, via voĉo gravos! Ĝis baldaŭ!

## Venu ekscii pri la libroj de la jaro

Hodiaŭ matene inter 11.00 kaj 12.30 en la salono *Hodler* estos prezentataj novaj eldonaĵoj. Ĉi-jare dum tiu ĉi tradicia programero de UK Tim Owen, Renato Corsetti, Stela Besenyei-Merger, Gbadamassi Latifou, Marija Belošević, Peter Baláž prezentos en plej diversaj kaj amuzaj manieroj – ĉu per deklamado, ĉu per intervjuo kun la verkinto... – la librojn. Venu sekvi, noti la plej interesajn titolojn kaj tuj poste viziti la Libroservon, kie vi povos foliumi kaj... eĉ aĉeti plurajn de la prezentitaj verkoj. Temos pri interesa kunveno, venu mem sperti tion!

## Ĉukpilka matĉo

La Ĉukpilka Teamo de Tanzanio veturas nun de Muleba al Aruŝo ĉ. 900km por veni ludi la futbalan matĉon je la 15-a ĉe la urba stadiono malproksime de la ĉefa stacidomo de busoj. Post la matĉo la teamo veturos al Najrobo en Kenjo, kie okazos la Afrika Ĉampioneco de ĉukpilko. Ne maltrafu la matĉon ĉi-posttagmeze!




**John Magessa**, KN 55

## Defioj kaj riskoj iri al Eŭropo

Ĉi-ĵaŭde, la 8-an de aŭgusto, ekde 12.30 en la salono *Lala* estos prezentitaj faktoj pri la temo. Ĉiuj interesatoj kaj scivolemuloj estas invitataj al la kunveno, dum kiu Mireille klarigos kaj respondos al ĉiuj demandoj sentabue. En sia vilaĝo en Svislando, Mireille prezidis Komisionon, kiu decidis pri akcepto aŭ rifuzo de eksterlandanoj.

## Nova programero

Homaj rajtoj en la lando, kiu plej malbone respektas ilin – la lasta en la listo. Mirejo prezentos tion, kion ŝi eksciis deĵorante ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo en Homrajta Konsilio. Ne eblas skribi en tie ĉi la nomon de tiu ŝtato. Venu do ĵaŭde je 13.30 en la salono *Čeliauskas* (Libroservo) kaj vi komprenos multon.

## Ŝikaga saluto



Estimataj kongresanoj de la 109-a UK en Aruŝo, gesamideanoj el la Esperanto-societo de Ŝikago, Usono, tutkore deziras al vi sukcesan kongresumadon! Vivu Esperanto!

**Viktoro Pajuk**, KN 100

Pro sanproblemoj Viktoro fine ne povis vojaĝi al la UK.

## Bankeda raporto

Unuafoje dum Universala Kongreso de Esperanto solidareca bankedo estis aranĝita. Ĉiu donacis kiom li aŭ ŝi povis kaj ĉiuj kongresanoj estis invititaj. Tiu ĉi momento tute vidigis la ideon de UK: komuna kunestado, gefrateco kaj humaneco. En *Lake Nyasa*, post bonveniga koktelo, ni malkovris vastan ĉambron enhavantan rondajn tablojn kaj seĝojn blanke kovritajn kun scenejo. La tuto estis tiom impona ke kelkaj gastoj ne povis malhelpi al si flustri: „ŝajnas nuptofesto!“. Fakte pluraj similaĵoj ekzistis, ĉar sinsekvis: donacoj por gravuloj, muzikistoj kiuj dancigis la invititojn. Pluraj belulinoj paradis por prezenti laŭmodajn vestaĵojn. JoMo koncertetis por emigi al la homoj veni jaŭde en la salono *Zamenhof* por plena koncerto de 20.00 ĝis 21.00. La festo nur paŭzis, ŝajne dum la tuta semajno ĝi pluokazos por ke niaj okuloj brilu kaj niaj koroj varmiĝu.

**Nicolas Gaufillet**, KN 74

# Kongresanoj hejmiĝis en Masaja vilaĝo



Unikan sperton ĝuis la kongresanoj kiuj vizitis la Masaj-festivalon en la tago de hieraŭ. La anoj de apuda Masaj-vilaĝo regalis la ekskursantojn per freŝe rostita bovo. Antaŭe eblis gustumi iom da freŝa bovida sango – tipa Masaja tradicio. Viglaj dancoj en buntaj kostumoj akompanis la viziton. La ĉefo de la Masaj-vilaĝo donacis Masaj-tipajn tukojn al la plej honoraj gastoj inter la vizitantoj, ĉefe al la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kaj al Francesco Maurelli. Francesco eĉ estis baptita per Masaj-nomo: *Forduni* estas la nova nomo. Laŭ la ĉefo de la Masaj-vilaĝo *Forduni* estas la persono al kiu oni turniĝas se oni volas solvi problemon.

**Thomas Bormann**, KN 130



Kongresanino kun Masaja virino

# Antaŭkongresaj raportoj (sekvo kaj fino)

Ni vizitis duan tribon, la Dagotojn, kiuj estas paŝtistoj. Tiu vizito, kvankam interesa, ŝajnis malpli intima ol la antaŭa. Laŭ mi la homoj ludis ian rolon.

Fine ni malkovis belegan lokon, la lagon Eyasi. Tie en fortega vento laboris fiŝkaptistoj en tre malfacilaj kondiĉoj. Estis amasoj da fiŝoj surgrunde, odoraĉo dismetita de la vento, homoj kiuj penis per siaj remiloj, retoj, pezaj barkoj, sed la tuto kun belegaj koloroj, blanka, bruna, oranĝkolora: admirinde!

La kvaran tagon, ni finis nian memorindan ekskurson per vizito al la tria parko, la tiel nomata Tarangire. Tie staras multnombraj baobaboj – tiuj imponaj arboj kun dika trunko kaj multaj branĉoj disiĝantaj al la ĉielo. Ĉe ili pendis nestoj de vualaj ploceoj (ploceus velatus) kaj sidis pavianoj senŝeligantaj la fruktojn de la arbo por eltiri



kaj manĝi la kernon. Multaj bestoj vivas tie, ĉefe aroj da elefantoj en familioj kun idoj malrapide paŝantaj de la rivero al la montetoj. Ni vidis ilin de tre proksime. Ankaŭ antiloj, ĝirafoj, bubaloj, simioj, gnuoj, fakoĉeroj… kaj eĉ en la supro de iu arbo longa pitono volvita ĉirkaŭ branĉo! Aliaj interesaĵoj estis multegaj termitejoj kun plurpintaj montetoj pli-malpli altaj kaj laŭinforme vaste etenditaj sub la tero.

Resume, ni travivis tre interesan ekskurson, kiu enkapigis al ni belegajn memoraĵojn por longa tempo! Dankon al la organizantoj, al la klera ŝoforo kaj al la afabla tradukantino.

**Elizabet Le Dru**, KN 324

# Ne forgesebla tago



Ne forgesebla tago: kaj la Masajoj kaj la bovaĵoj atendis nin. Estis dum Masaja festivalo, kie ni estis speciale invititaj. La aranĝo kunigis i.a. ĉefojn kaj gravulojn el diversaj grupoj.

**Slyvie Roques**, KN 597



Sur la apuda foto: de maldekste Sylvie kaj en la mezo estas la granda Masaj-estro de la tuta Orienta Afriko, nome Kenjo kaj Tanzanio.

## Okazis sukcese la Tago de Lernado

La Tago de Lernado ĉi-jare estis inter la malmultaj programeroj, kiuj okazis hibride. Riĉa ses-hora programo marde allogis plurajn kongresanojn, sed same virtualajn partoprenantojn de Brazilo, tra pluraj eŭropaj landoj kaj Irano, ĝis Japanio. La partoprenantaro vigle sekvis la prelegojn, sed same la diskutojn.
Enkonduke, salutvortojn adresis la prezidanto de UEA Duncan Charters, kaj la prezidanto de ILEI Ahmad Mamduhi. Same sekvante la tradicion, la unua prelego estis dediĉita al la gastiganta lando. Mulele Mbassa Makaranga prezentis la eduksistemon de Tanzanio en ĉiuj etapoj: de la infanvartejoj ĝis superaj studoj. Mireille Grosjean (Svislando) kiel bona konatino pri la afrika movado, reliefigis la instruadon en Afriko, kun atentigoj al defioj kaj evoluo, aldonante plurajn ekzemplojn. Sac. Gabriel Anda (Kameruno) prezentis la spertojn pri la edukado de la plej junaj infanoj kadre de la antaŭ unu jaro fondita lernejo "Baba Simon" kiun subtenas IKUE. Esperanto-instruadon en Burundo kaj Afriko prezentis ĵus elektita nova estrarano de ILEI kaj gvidanto de la Afrika Komisiono de UEA Manirakiza Aime Patrick (Burundo). Li ankaŭ surpodigis esperantistojn el Burundo kiuj donis gravan kontribuon al la disvastigo de la movado kaj instruado de Esperanto. Ĉiuj kvar prelegoj vekis grandan intereson ĉe la ĉeesta kaj ankaŭ virtuala publikoj kiuj starigis plurajn demandojn. Malgraŭ plilongigo de la antaŭpaŭza bloko, neniu bedaŭris pro la tempo, ĉar vere oni povis multon novan aŭdi kaj same multon lerni. La duan blokon de la prelegoj malfermis Miroslav Malovec (Ĉeĥio) kun la prelego "Kiel oni kreas vortaron? La prelego donis eblon iomete gustumi la eldonan agadon de la lando, kiu gastigos la 110-an UK. Stela Besenyei-Merger (Hungario) dum la prelego "Esperanto kaj edukado: La rolo de literaturo" apartan atenton donis al la "bobelarto", kaj instigis la kongresanojn verki, kaj partopreni la konkursojn. Profesian agadon rilatan al la instruado de Esperanto al la infanoj kaj gejunuloj laŭ la ekzemplo de la lernejo "Granda Ursino" en La Chaux-de-Fonds, Svislando. Monika ankaŭ kunportis diversajn lernilojn kiujn ŝi transdonis al la esperantistoj kun kiuj iliaj lernantoj starigis korespondadon, sed ankaŭ ne mankis materialo por aliaj afrikaj e-istoj kiuj instruas Esperanton. Kvankam la titolo de la prelego de Kristin Tytgat (Belgio) "Paroliga kurso dum kongreso – ĉu utila programero?" entenas demandosignon, kaj de la spertoj de la prelegantino mem, sed ankaŭ de partoprenantoj evidentiĝis, ke la paroligaj kursoj ne nur estas utilaj, sed vere bonegaj rimedoj por kaj paroligi kaj kuraĝigi esperantistojn, ĉu komencantojn, aŭ tiujn kiuj vivas ie izolitaj. La lastan prelegon "Ĉu ni forgesis pri la universalaj valoroj?" prezentis Marija Belošević (Kroatio) kiu kunordigis la tutan programon. Ŝi atentigis pri la graveco de valoroj en la nuna tempo, kaj nepro pri ili ankaŭ pensi dum la Esperanto-kursoj. Post la diskutoj, Katalin Kovats donis gravajn informojn rilate al *edukado.net* kaj KER-ekzamenoj.

**Marija Belošević**, KN 306

## Kuba saluto

Estimataj geamikoj kaj gekongresanoj,



Mi nomiĝas Daimi Doval Delsa el Havano. Mi estas aktiva membro de Kuba Esperanto-Asocio.

Mi sendas al ĉiuj kongresanoj kaj partoprenantoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio, varmajn salutojn. Sukcesan kaj mirindan kongreson kiu sendube lasu pozitivan spuron en via vivo.

Bedaŭrinde, mi kune kun mia edzo Miguel Ángel González Alfonso, kiu ankaŭ estas aktiva membro de Kuba Esperanto Asocio, strebis partopreni tiun ĉi kongreson, sed tio ne eblis ĉi-jare. Espereble, ni renkontiĝos venontjare en la kadro de la 110-a UK, dum kiu mi volonte prezentos romantikajn kanzonojn en Esperanto.

Ni ne povis realigi nian deziron partopreni en tiu ĉi grava kaj historia renkontiĝo, nun okazanta en Afriko, por ĉeeste regali vin per miaj kanzonoj kaj arto. Tamen mi invitas vin spekti per *https://mallonge.net/1f6* mian kanzonon, kies titolo estas "Universala Kongreso". Temas pri dediĉo al la 109-a UK. Mi esperas, ke tiu ĉi kanzono plaĉos al vi ĉiuj. Korpe mi loĝas je pli ol 13000 kilometroj de Tanzanio, sed mia animo kaj koro estos inter vi ĉiuj, kiam vi aŭskultos mian kanzonon.

Kiel mi diris pli frue, ni ŝatus partopreni la 110-an UK en Brno, Ĉeĥio, sed niaj propraj rimedoj estas limigitaj. Tial bonvenas ĉies libervola subteno. Mi elkore antaŭdankas kaj deziras sukceson al la 109-a UK.

Vivu Esperanto!
Vivu Tanzanio!
Vivu UEA!

**Inĝ. Daimi Doval Delsa**
Havano, Kubo



Foto dum la bankedo - LKK-prezidanto, UEA-Estraranoj kaj tanzaniaj oficialuloj

## Zorgu pri la enhavo de via valizo kun atento!

Kiam mi estis en la flughaveno de Kotonuo Benino por reveni al Svislando, mi uzis objekton, kiu estis dum mia restado en Benino profunde en mia valizo. Subite mi vidis sur tiu objekto formikojn. Mi sciis, ke mi revenis kun fibestoj. Alveninte al mia loĝloko en mia svisa vilaĝo, mi malfermis mian valizon, uzis kontraŭinsektan likvaĵon kaj disŝprucigis ĝin sur la enhavo de mia valizo kaj tuj fermis la valizon denove. Post 30 minutoj mi malfermis la valizon, prenis ĉiujn vestaĵojn kaj metis ilin en la lavmaŝinon, ankaŭ la ne uzitajn, purajn. Poste mi vicigis ĉiujn objektojn sur la planko apud la valizo kaj disŝprucigis kontraŭinsektan ligvaĵon sur ili. Tute funde de mia valizo mi trovis neston de formikoj, grandan kiel estas granda dika monero; formika reĝino demetis ovojn... Mi zorgeme kaptis tiun amason da fibestoj kaj detruis ĝin. Mi prenis mian malplenan valizon kaj metis ĝin dum plena tago sub la suno ĉe la balkono. La sunradioj bone ankaŭ desinfektas aferojn. Finfine mi fermis la zipon de mia valizo je 95%, disŝprucigis denove insekticidon enen kaj fermis la valizon komplete; sekve de tio mi ordigis ĝin en mia kelo kiel kutime.

Kiam oni vojaĝas tra la mondo, oni nepre evitu transporti fibestojn de lando al lando, de kontinento al kontinento. Tia transporto povas esti katastrofo. Povas esti transporto de parazitoj, insektoj, formikoj kaj de semoj de plantoj. Evidente vi scias, ke transporto de bestoj, plantoj, fruktoj kaj legomoj estas leĝe malpermesata, pro simila risko de sovaĝa disvastiĝo.

Mi konas personon, kiu luktis dum ses monatoj kontraŭ infestado de fibestetoj en sia loĝejo. Fine la fakulo sugestis, ke ŝi kaptu kelkajn. Ŝi faris. Li sendis la bestetojn al fakula institucio, kiu identigis ilin kiel fibestojn el Barato. La persono konfirmis, ke ŝi vojaĝis al Barato ses montojn antaŭe…

Resume: alveninte hejmen, zorgu pri la enhavo de via valizo kun atento, eĉ se atento ne sufiĉas, ĉar etaj semoj aŭ fibestoj estas apenaŭ videblaj. Lavu ĉiujn vestaĵojn, ankaŭ tiujn, kiujn vi ne uzis. Purigu per adekvata likvaĵo la objektojn kaj la valizon mem, inkluzive ĝiajn radetojn. Kaze ke vi trovas ian neston, ian amason, eliminu ĝin bruligante ĝin (paku ĝin zorgeme, metu ĝin en rubujon, kaze ke via rubaĵo iras al bruliga firmao).

**Mireille Grosjean**, KN 94



Oomoto-Organizo salutas vin kaj invitas al la Utafesto, Japanio, la12-an de oktobro 2025.

## Bonvenon al Litovio! Bonvenon al BET-59!

La tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2025 denove okazos en Litovio. Ĉi-foje BET-59 okazos en la dua la granda urbo de Litovio, Kaunas, de la 5-a ĝis la13-a de julio 2025.
BET-oj estas organizataj ekde 1959 laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio.
BET-59 gastos en la Universitato Vytautas La Granda ( str. Daukanto 28 ). Kaunas estas konsiderata ĉefurbo de Esperanto en Litovio, ĉar en Kaunas ĉiam funkciis kaj funkcias ankaŭ nun sidejo de Litova Esperanto-Asocio. Diversaj informoj pri la urbo estas troveblaj per https://visit.kaunas.lt/en/.
Organizantoj de BET-59 ĉi-foje estas ne nur Litova Esperanto-Asocio, sed ankau Universitato Vytautas La Granda kaj Monda Centro de Litovoj. Tion antaŭvidas fine de 2023 subskribita kunlabora kontrakto inter Litova Esperanto-Asocio kaj la universitato. Litovan Esperanto-Asocion kun la Monda Centro de Litovoj ligas multjara kaj fruktodona kunlaboro.
Esperantistoj havos tre luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Ni povos senlimige uzi la tutan infrastrukturon de la universitato (kunsidejoj, salonoj, aŭditorioj, studentaj domoj, universitata kafejo, komputiloj, alia organiza tekniko ktp).
La organizantoj proponos al la partoprenantoj de BET-59 vastan gamon de loĝeblojn – de simplaj nemultekostaj studentaj domoj ĝis la kvarstelaj hoteloj.
Manĝado ankaŭ estos organizita.
BET-59 havas ĉiuspecan subtenon kaj helpon de la urbaj instancoj de Kaunas kaj de la tutlandaj ŝtataj instancoj.
Ni organizos vere altnivelan internacian esperantistan aranĝon kaj organize kaj programe.
La programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa.
Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.
Ni atendas ĝis 500 gastojn el 30-40 landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.
Jam aperis la unua Informilo pri BET-59 ĉe *https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/* kaj tie vi trovos ĉiujn bezonatajn detalojn pri la aranĝo.
Jam nun eblas aliĝi al BET-59. Bonvenon al Litovio! Bonvenon al BET-59!

**Povilas Jegorovas**

## Konga arbo

Venu ĉeesti al posttagmezo de teatro, kies titolo estas "Konga arbo". Temos pri unupersona teatraĵo kiu rakontos pri la malsekureco en DR Kongo.
Dato: ĵaŭdon, la 8-an de aŭgusto, de 16.15 ĝis 17.00.
Kie: salono Zamenhof
Artisto: Kambale Amani Love